



**5(173)  
2019**

# Apudvistula Bulteno

**de Krakova Societo ESPERANTO**


**Bultenon redaktas:** ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,  
**Adreso por korespondi:** str. Sokolska 13, 30-510 KRAKÓW

Danuta Perier-Berska

trad. Lidia Ligęza

\*\*\*

Ni ariĝu ĉe tablo  
Kiam stel' ekbrilos  
Ni rigardu ĉielon  
Tie Dia Filo  
Reĝas ĉe Patro surtrone  
Ornamita sceptre krone  
Iam tre Marica  
Kaj nun ĝojoplena  
Tiel kiel ni hodiaŭ  
Ni ariĝu ĉe trogo  
Ekkantu peane  
Kaj gaje trinku vinon  
Naskiĝas Infano  
En povra ĉemizeto  
Sur fojneto ĉe bestoj  
Kun ĉiela bileto  
Por ĉiu el ni



Ekkuris al Betlehemo  
Anĝeloj  
ho! ni ĉiuj  
baldaŭ ĝojos en helo.  
Post tutjara ĉi turmento, fatalo  
ni genuos ĉe Etulo  
en stalo.  
Kiel stelo ekbrilos  
Bon' Lia.  
Ni tre zorgu  
por estingu ĝi neniam.

\*\*\*

Oblato per mielo ŝmirita  
kunluas la buŝon  
tiel malfacile eldiri bondezirojn  
ili ne volas  
ne repaciĝis  
ne scipovas  
malvarmiĝas barĉo  
karpo atendas

\*\*\*

Ili ne serĉas  
donacojn sub abieto  
por ili ĉiu tago  
estas donaco  
kun la unua stelo  
ili eksidos por vespermanĝi  
interrompos oblaton  
ekkantos malnovajn kantikojn  
frosto pentros fenestrojn  
en Anĝelojn de ilia infaneco

## Esperantistoj kiel internaciistoj

Esperantistoj praktikas internaciismon. Tamen preskaŭ nenion ni provas en esperanta literaturo pri ĝiaj kvalitoj, fenomenoj kaj problemoj.

En la "Deklaracio pri la esenco de la esperantismo" (Boulogne-sur-Mer, 1905, 08-9) ni trovas jenajn konstatojn.

"La esperantismo estas **penado disvastigi** en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu donas al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kio povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj.

Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la esperantismo, estas lia afero pure privata, por kio la esperantismo ne respondas [...]

Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiuj celoj li ĝin uzas."

La nocio de internaciismo apartenas al tiuj, kiuj ne estas sufiĉe komprenataj, kaj ricevas diversajn signifojn (ofte tre subjektive tendencajn), depende de intencoj de la uzantoj. Plejparte aplikata fare de politikistoj ĝi diferenciĝas per diversaj atribuoj, precipe laŭ teritoria kaj ideologia ampleksoj.

La principoj de la internaciismo proklamataj en statutoj de politikaj partioj aŭ de internaciaj organizaĵoj enhavas:

- kunlaboron en la strebado al libereco kaj progreso
- amikecon
- interkompreniĝon per informado pri vivo, esperoj, aspiroj, problemoj kaj obstakloj, atingoj kaj sukcesoj de diversaj nacioj
- solidarecon
- fratecon
- respondecon pri sorto de la homaro

De tempo al tempo en niaj movadaj skribaĵoj oni atribuas al esperantistaro kvalitojn de internaciistoj. Estas konstatita socia fakto, ke per aplikado de la komprenebla kaj komunikiva lingvo ĉiu esperantisto bonŝancas obei almenaŭ al la baza principo de la interkompreniĝado.

Ni bonŝancas atingi tian staton de la memkonscio, ke la Esperanto-movado almenaŭ provu difini la kvalitan faceton de la internaciismo anstataŭ la ĝisnuna – preskaŭ ekskluzive – kvanta.

Reprezentantoj de diversaj nacioj kaj socitavoloj starigas antaŭ esperantistoj la demandon pri **esenco** de esperantismo (Esperanto-movado). Informoj pri nombro de internaciaj eventoj kun apliko de Esperanto, eĉ se ne seniluziigigas la demandintojn, almenaŭ ne enhavas tiun inform-elementon, kiun ili rajtas atendi.

Tiuj valorojn ni ankoraŭ ne rekonis. Tie aŭ aliloke oni konfesas pri "fortaj sentoj" aŭ "ekkompreneo", plejparte evitante difini ilin, aŭ pro simpla vivopremo oni rezignas pri povoj analizi.

Se esperantistoj mem ne provas aŭ ne scipovas nomi la plej karakterizajn fenomenoj de la partoprenata procezo, ili kvazaŭ kontribuas al misterigo de sia grupa spertado. Estas ja leĝo de ekkono – doni la nomon al la ekkonita. Sen tio, la homo, kies pensado okazas vortume, ne povas ek-konscii.

Esperantistaro ne rajtas plu ignori tion, kio estas rekonebla kiel psika sekvo de la lingvo-aplikado aŭ movadaktivado. Rekonita, nomita kaj (se eble?) difinita ĝi povas esti la grava kontribu-aĵo, kiun la mondo atendas de esperantistaro.

Por iusence plifaciligi la taskon, ni devas – penetrante ankaŭ la mondon de ideoj – provi difini tiajn homojn, kaj laŭ ĝenerala opinio posedas ecojn de internaciistoj.

laŭ "Skizo pri personeco de esperantisto" de Tyburcjusz Tyblewski

## Popolaj proverboj kaj diraĵoj ligitaj kun tempo de Kristnasko

Dum Advento ĉiu bofil' ideala, sed mankas bofiloj en temp' karnavala.

Se dum Advento venos amfascino, jam dum Kristnasko vi havos edzinon.

Se decembro komenciĝas per frosto sekiĝos putoj dum Pentekosto.

Se en pluvakvo Barbara nia Kristnasko certe estos glacia.

Se froston portas Barbara kaŝu sledon, preparu ĉaron.

Sankta Nikolao montru la favoron, kiom ni havas koton, tiom donu oron.

Dum sankta Lucia ago speciala: tago kontraŭ nokto batalas.

Sankta Lucia kara tagon pli longan faras.

Dum sankta Tomaso plej longa noktopaso.

Kiam bela vetero dum Adam' kaj Eva vintro frue kreas.

Ĉirkaŭ Naskiĝo Ida portu botojn solidajn.

Se Kristo naskiĝas antaŭ plena luno dum sekvonta jaro  
ne mankos faruno.

Se belvetere naskiĝas Kristo ĝoju plugisto.

Se dum Stefano koto ĝis genuoj por Resurekto sledon konstruu.

Kia vetero dum Stefano regas, tia februare egas.

Se dum Silvestro frosto tenas certe peza vintro venas.

Se januaro pluve fervoras – julio ploras.

Post Novjaro jena trafo: tago pli longa je salto de ŝafo.

Kiam Tri Reĝoj belveteron donas, ne dormu longe, estu mastro bona.

De Tri Reĝoj rezultato: tago pli longa je koka piedplato.

Tri Reĝoj en ventoj faras ordon kaj skribas krucetojn sur ĉiu pordo.



### Laŭ kristana kalendaro:

Advento – 4 semajnojn  
antaŭ Kristnasko

Pentekosto, poll. Verdaj  
Festoj  
– 50 tagojn post Pasko

Sankta Barbara – 4.12.

Sankta Nikolao – 6.12.

Sankta Lucia – 13.12.

Sankta Tomaso – 21.12.

Adamo kaj Eva – 24. 12.

Kristnasko – 25. 12.

Sankta Stefano, poll.  
Szczepan – 26. 12.

Sankta Silvestro – 31. 12.

Tago de Tri Reĝoj – 6. 01.



**Ĝojplenan, kvietan, sanan Kristnaskon  
kaj prosperan, esperodonan, grandiozan  
Novjaron 2020  
elkore bondeziras Redakcjo de AB**

**Krakova Societo ESPERANTO**

**La programo de la renkontoj de oktobro ĝis decembro 2019 j.**

- 3. 10. 2019 j.** – Lidia Ligęza. Anna Świrszczyńska. Mi estas nur virino. Poemoj de la autorino  
en traduko de Tomasz Chmielik
- 10. 10. 2019 j.** – Lidia Ligęza. Esperantaj poetoj S. Braun, S. Karolczyk, E. Matkowski
- 17. 10. 2019 j.** – Grażyna Porada. Esperantaj lingvaj ludoj
- 24. 10. 2019 j.** – Aŭtunaj impresoj de klubaninoj. Rememoroj.
- 7. 11. 2019 j.** – Alicja Sacha. Personeco de esperantisto laŭ Tyburcjusz Tyblewski
- 14. 11. 2019 j.** – Lidia Ligęza. Fabeloj de La Fontaine en traduko de Antoni Grabowski
- 21. 11. 2019 j.** – Grażyna Porada. Esperantaj lingvaj ludoj
- 28. 11. 2019 j.** – Lidia Ligęza. La Reĝo de Elfoj el J.W. Goethe. Du esperantaj tradukoj de  
Antoni Grabowski
- 5. 12. 2019 j.** – Grażyna Porada. Esperantaj lingvaj ludoj
- 12. 12. 2019 j.** – Lidia Ligęza. Pollingva prelego por Kulturcentro „Podgórze”.  
L. Zamenhof – Doktoro Esperanto
- 19. 12. 2019 j.** – Ara traduko el publikaĵo de Krzysztof kaj Katarzyna Braun,  
ĉapitro „Abieto aŭ arbeto”